

Lord George Gordon Byron ,

## Nokt' en la koro

*tradukita de Leopold Blumental*

Nokt' en la koro . . . la harpo kuŝas . . .  
 Vi tuj ekkantu, kantisto!  
 Se vi la kordojn de l' harpo tuŝas,  
 Vi miron faras, artisto.

Se kor' ankoraŭ havas esperon,  
 Per kanto ĝi revekiĝos;  
 Se la okulo kaŝis larmeron,  
 Denove ĝi eklarmiĝos.

Kant' via tondru mondan doloron!  
 La gajon mi ne komprenos . . .  
 Vi min plorigu, movu la koron,  
 Aŭ mia brust' ne eltenos.

Ĝi de suferoj longe manĝiĝis,  
 Silentan premis la ĉeno! . . .  
 La tempo venis . . . ĝi jam pleniĝis  
 Kiel vazet' de veneno.

*Traduko de la Angla poemo "My soul is dark" de LORD GEORGE GORDON BYRON (\*1788-01-22 - †1824-04-18) en Esperanton de LEOPOLD BLUMENTAL (Leo Belmont, \*1865-03-08 - †1941-10-19).*

*Arg-1018-2061 (2014-05-20 16:42:26)*

*Pri la tradukinto vidu la vikipediejn [http://eo.wikipedia.org/wiki/Leo\\_Belmont](http://eo.wikipedia.org/wiki/Leo_Belmont). La poemo-traduko troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php> kaj en [http://eo.wikisource.org/wiki/Fundamenta\\_Krestomatia/Nokt'\\_en\\_la\\_koro](http://eo.wikisource.org/wiki/Fundamenta_Krestomatia/Nokt'_en_la_koro).*